

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO II^a : MAJO 1922

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE LA

«KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO»

Jarkotizo : 5 pesetoj

GRUPOJ ALIĜINTAJ AL K. E. F.

BARCELONA STELO, Marqués del Duero, 101	BARCELONA
NOVA SENTO, Enna, 156	BARCELONA
PACO KAJ AMO, Asturias, 1	BARCELONA
SEMO (A. E. P.), Carme, 30	BARCELONA
LA RONDO, Provença, 131	BARCELONA
ESPERANTAJ KANTISTOJ, Baix de S. Pere, 77	BARCELONA
LA METIISTO, Travessia S. Antoni,	BARCELONA
LUMON, Carrer Major,	TERRASSA
ESPERANTISTA JUNULARO,	TERRASSA
ĜERONA ESPERO, Ajuntament,	GIRONA
STUDENTA JUNECO, Seminari,	GIRONA
APLEC «ESPERANTA GRUPO», Mendizábal, 3	SABADELL
BELA ESPERO, Carretera de Vich, 41	MANRESA
NOVA SEMO, Major, 15	REUS
LABORO ESPERANTA, S. Antoni, 1 i 3	VILANOVA I GELTRÚ
ESPERANTA IDEALO, Mn. Cinto Verdaguer, STA. COLOMA DE FARNÉS	
REGENERACIO,	SALT
EMPORDANA EBENAJO,	ARMENTERA
ESPERANTA NESTO, «Joventut Catòlica»,	RIPOLLET
ESPERANTISTA AMIKECO, Plaça Bernardi, 10	MANLLEU
FRATECO, P. Pi i Margall, 14	VENDRELL
ESPERANTISTA KLUBO «PALMA»	PALMA DE MALLORCA
TARRAGONO ESPERANTA, Unió, 9	TARRAGONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gitaro*

Redaktoro: Jaume Grau Casas

Aplec Esperantista del Vallès Nova «Esperanta Nesto» en Ripollet

ANKORAU nova provo pri la revigliĝo de la esperanta movado en nia lando estas la daŭrigo de la esperantistaj jarfestoj en la bela regiono de l'Vallès. Al tiu regiono, kiun nur la montaro Tibidabo apartigas de la Barcelona urbego, apartenas la urboj Terrassa kaj Sabadell, veraĵ bastionoj de Esperantismo, kaj la vilaĝoj Rubí, Sardanyola kaj Ripollet, kie ankaŭ la arbo de nia idealo bele burĝonis. Ne estas mirige, do, ke la nunjara festo esperantista de l'Vallès estis ĉeestata de pli ol 150 gesamideanoj el la nomitaj lokoj, nek ankaŭ ke la vilaĝo Ripollet, kie samtempe oni festis la starigon de nova «Esperanta Nesto», estis dum la pasinta Pasklundo kvazaŭ edena Esperantujo.

La lasta «Aplec» iom diferenciĝis de la antaŭaj per tio, ke ĝi ne estis festo en arbaro nur por la samideanoj, sed solena kunveno en Ripollet, kun propaganda mitingo. Pri ĝia sukceso parolas la jenaj faktoj.

ALVENO AL RIPOLLET

Matene, je la oka kaj duono, alvenis al la stacio multaj samideanoj el Barcelona kaj post kelkaj minutoj desaltis de vagonaro el Terrassa pliaj samideanoj el Terrassa kaj Sabadell. Ilin atendis la afablaj samideanoj el Ripollet.

Kvin esperantaj flagoj ekflagris meze de la esperantistaro, tiuj de la Grupoj «Lumon», Esp. Grupo «Aplec», «Esperantista Junularo», «Esperanta Nesto» kaj «Barcelona Stelo», kaj oni iris demonstracie al la Urbdomo.

Tie diris bonvenajn vortojn al la gesamideanaro la Urbestro S-ro Miquel Clos, kiun ni dankis kaj gratulis pro lia helpemo kaj entuziasmo. La esperantaj flagoj estis elmetataj ĉe la balkonoj de la Urbdomo, kie ili restis dum la tuta tago proklamante la idealecon kaj progresemon de la loĝantoj de Ripollet.

ESPERANTA DISERVO

Je la deka okazis en la paroĥa preĝejo, ornamita per la esperantaj flagoj kaj hele lumigita, solena diservo kaj religia festo al la Virgulino de l'Espero, kies figuro radiis ĉe la ĉefa altaro. Pastro Planas, Paroĥestro de Ripollet, parolis en Esperanto oferante la Sanktan Meson por la paco de la samideanoj mortintaj dum la milito kaj por la triumfo de Esperantismo. La «Orfeo de Ripollet» kantis latinajn kaj esperantajn kantojn.

Post la meso oni vizitis la antikvan preĝejon kaj multaj supreniris al la sonorilejo, de kie oni ĝuas belegan panoramon. Ĉis la horo de la komuna tagmanĝo, la gesamideanoj promenis tra la vilaĝo kaj ĉirkaŭaĵoj.

FESTENO

Je la unua posttagmeze komenciĝis la Festeno. Sidis ĉe la prezida tablo la Urbestro S-ro Clos, la Prezidanto de K. E. F. S-ro Amades, Pastro Planas kaj kelkaj eminentaj samideanoj. Multaj fraŭlinoj gajigis la festejon per sia ĉeesto.

Ĉe la ĉampano, komencis la tostojn la Redaktoro de *Kataluna Esperantisto*, kiu dediĉis amikan rememoron al la ĵus forveturinta samideano Gili Norta, konata kaj estimata de ĉiuj. Samideano Chaler, Prezidanto de la Terrassa grupo «Lumon», fondinto de «Esperantista Junularo» kaj entuziasma gvidanto de sennombraj kursoj, eldiris sian fervoron por nia idealo kaj rekomendis nelaciĝon. Pastro Planas longe glosis la signifon de la okazanta festo kaj aŭdis ovacion de danko al liaj klopodoj. S-ro Amades salutis la lokajn samideanojn en la nomo de K. E. F. S-ro Urbestro esprimis denovan saluton al ĉiuj kaj deziris sukceson al Esperanto. Kun similaj bondeziroj parolis ankaŭ S-roj Piñol, Pastro Angel Garriga, Andreu, Albiol k. a. Ĉiuj estis aplaŭde aŭskultataj. Plena ĝojo regis la tagmanĝon, dum kiu nia kara lingvo ĉie sonoris.

Je la kvara, en la Placo de Ripollet, estis dancado de sardanoj. Niaj junaj gesamideanoj partoprenante faris ankaŭ belan rondon.

PROPAGANDA KUNVENO

Je la kvina komenciĝis antaŭ granda ĉeestantaro la literatura kaj muzika festo, sekvata de propagandaj paroladoj, kiel inaŭguro de «Esperanta

Nesto» en Ripollet. En flagornamita scenejo eksidis la Urbestro, la Prezidanto de la nova Grupo kaj tiu de K. E. F., akompanataj de reprezentantoj de la jenaj Grupoj: «Lumon» (Terrassa); «Esperantista Junularo» (Terrassa); «Aplec Esperanta Grupo» (Sabadell); «Bela Espero» (Manresa); «Barcelona Stelo», «Paco kaj Amo», «La Metiisto», «Esperantaj Kantistoj» kaj «Semo» el Barcelona.

La Orfeono de Ripollet, sub la lerta gvidado de S-ro Artigas, kantis kelkajn belajn pecojn. Fraŭlinoj Agna Bulbena kaj Mercè Altimira kantis, sole, per belega voĉo, en lingvoj kataluna, esperanta kaj itala. Ankaŭ bele deklamis poeziojn Fraŭlinoj Pepeta Bertran kaj Assumpta Pí.

Poste ekparolis al la ĉeestantoj S-ro Chaler. Li diris, ke la celo de la esperantistoj estas la enkonduko de internacia lingvo, sed ke ni ĉerpas la forton por niaj propagandoj el sento pli profunda: deziro je interhoma spirita kompreno kaj frata paco. Li finas dezirante ke el la nova «Esperanta Nesto» forfluu amaso da bonaj kaj nelacigeblaj batalantoj.

S-ro Angel Sagarra, instruisto el Ripollet, prononcas kelkajn vortojn favorajn al nia ideo kaj deklaras sin unu el ĝiaj fervoraj adeptoj.

S-ro Grau, Redaktoro de *K. E.*, esprimas koran saluton al la loĝantaro de Ripollet kaj kuraĝigan gratulon al la fondantoj de la nova esperanta societo. Per diversaj argumentoj li vidigas la neceson de internacia lingvo kaj prezentas Esperanton kiel plej bonan solvon, pritraktante ĝian perfektecon super la nomataj naturaj lingvoj. Pruvante la eblecon de ĝia uzo kiel lingvo vivanta, li sin turnas en esperanto al la samideanaro kaj per varma parolo esprimas la ĝojon kiun oni sentas dum festoj kiel la nuna, laŭdas ilian refreŝigan efikon ĉe la laciĝemaj kamaradoj, kaj konstatas ilian gravecon por la movado, ĉar tiel iom post iom disvastiĝas nia idealo aŭ reviviĝas ĝiaj iamaj defendintoj. Li finas dezirante ke ĉiu senescepte oferu sian helpon al la propagando, subtenante per materiala kaj morala aliĝo la taskon de nia «Kataluna Esperantista Federacio», kiu penas interrilatigi ĉiujn samideanojn tra la katalunaj urboj kaj vilaĝoj, kaj per ilia kunligo montras ke ankaŭ en nia internaciema lando Esperantismo vivas, kreskas kaj floras.

Finante la belegan feston, la Orfeono, akompanata de ĉiuj gesamideanoj, kantis la esperantan himnon.

Ĉe la stacio, je la disiĝo de tiuj samideanoj veturantaj al Sabadell kaj Terrassa kaj tiuj veturantaj al Barcelona, denove sonis la strofoj de «La Espero» kaj adiaŭe salutis la flagoj de niaj Grupoj. Dankon al niaj amikoj de Ripollet... kaj sukceson!

El problema de les llengües

— «Eccellenza, questo è un inferno.»

— «No, caro signore; questo è piú humano, ma piú terribile, forse: questo è Babel.»

Tal impressió paraularen En Gaziel i un funcionari italià a Gènova davant la confusió de llengües que es presenta, en aquesta Conferència, més agudament que mai.

I afegeix per son compte el nostre cronista català: «Espanta pensar el que passarà quan aquestes mil llengües irreductibles comencin a parlar en plena Conferència».

Efectivament: la moderna ideologia política universal, alligona per la Gran Guerra, cada dia acorda més equitat, exigeix més respecte per a les característiques de cada poble. I la varietat de llengües nacionals presenta una realitat cada dia més viva, una vida cada dia efectiva. I a mesura que progressa la facilitat de comunicacions entre els pobles per mar, terra i aire, i que la comunitat d'interessos va fent-se més real, tots els pobles fan més tot un sol poble, i la necessitat d'entendre's esdevé molt més urgent.

* * *

Aquest fet pot fer semblar als lloscos, als totxos per conveniència immediata, que s'imposa la llei de renunciament a la vida oficial de les llengües avui menys parlades. I no volen comprendre que l'idioma, pur instrument d'expressió ordinàriament, quan, per qualsevol circumstància, un poble el sent com a símbol de la pròpia personalitat que el caracteritza, esdevé la manifestació tangible de la pròpia ànima, i, aleshores, el més lleu renunciament és una covardia espiritual que cap home ni cap poble honest pot acceptar a cap preu material, mundà, polític. I és aquest sentit espiritual, aquesta força d'ànima, d'eternitat, que ha vingut prenent el català, per virtut de la humaníssima reacció que produeix tota pressió, i la pressió castellana fa molt de temps que alimenta la reacció catalana.

Per altra banda, traïr la pròpia condició, subjectivament és un crim, i, objectivament, una niciesia; perquè la perfecció castellana és una aspiració noble i raonable en un castellà, però, si amb prou feines hom pot perfeccionar-se en la pròpia condició, només hi cap lògicament l'aspiració d'ésser un perfecte hipòcrita o una perfecta màscara en tot català que aspiri a tota perfecció que no sia la catalana.

Aquest principi de respecte a les característiques de cada poble, quin resultat dona a la comunitat? Suïssa, poble petit on es parlen i respecten igualment tres llengües diferents, no ha presentat mai els conflictes lingüístics, tan freqüents i tan vius, que tothom pot recordar de l'Àustria d'ahir, i,

encara, de l'Espanya d'avui. El reconeixement oficial i equitatiu de les parles diverses dels pobles que formen una comunitat, dóna la sensació de justícia entre els pobles germans, i sorgeix espontàniament la voluntat, per simpatia, per educació, per orgull de superioritat individual, d'aprendre i usar la llengua del pròxim dins d'un ambient de dignitat i de llibertat com a Suïssa. — Ho sentis, Espanya?

Si l'Àustria d'ahir hagués comprès que el respecte i equitat entre les característiques populars, regionals o nacionals que integren un Estat presenta la vera solució de confraternitat... Si l'Espanya d'avui sabés comprendre la lliçó rebuda per l'Àustria d'ahir... Els anglesos encara no han volgut enganyar el món dient que l'anglès és l'idioma britànic—sentiu, castellans?— I, només la negativa a respectar justes i, abans, modestes aspiracions irlandeses, ha fet el miracle de gairebé ressuscitar l'antiga llengua d'aquella illa. La gosadia castellana, de la política de Madrid, de no acceptar altra llengua espanyola que la castellana, i de negar a totes les altres els mateixos drets, està encenent la flama catalana, que dóna goig de veure; i, per molt reduïda i oblidada que fos, tota altra llengua hispànica, haurà de trobar vida i vigor a l'escalf de la pressió castellana. I a l'exigència de fer parlar castellà per «cortesía» es farà cada dia més ferma la «voluntat» de parlar per «dret» la llengua pròpia. La cortesía només pot ésser espontània i cordial, i la cordialitat només cap dins la sensació de justícia, d'equitat.

* * *

A grans mals grans remeis. Heu's aquí perquè ens plau l'agudització babèlica. Volem solucions, com més radicals i definitives millor.

Cada dia es presenta més evident la impossibilitat de donar a cap llengua nacional el privilegi d'oficialitat internacional. Cada dia més enèrgicament la consciència universal d'homes i pobles lliures, justos i sincers rebutja tot intent de privilegi. I, sobretot, d'un privilegi tal que ben aviat donaria a un poble una superioritat i unes ínfules que promourien tants i tals conflictes que determinarien la natural reacció i avivament d'amor propi, esdevenint aquesta solució un remei pitjor que la malaltia.

La Babel llegendària trobà solució en la dificultat de comunicacions que mantenia els pobles apartats. La facilitat de comunicacions que fa avui de tots els pobles un sol poble, fa imminent l'adopció d'una llengua auxiliar internacional; però l'esperit universal cada dia més ferm, d'equitat entre tots els pobles, priva que aquesta llengua sia la basca ni l'anglesa, la castellana ni la francesa, la italiana ni l'alemanya, la russa ni la catalana, la xina ni la portuguesa, etc... Perquè aquestes llengües són característiques d'un poble, d'un esperit nacional, d'una història parcial, d'una evolució particular, com els antics sistemes de mesures, que, constatem-ho de passada, cap ha cedit son lloc al d'un altre poble.

Cal un idioma que a base de l'essència comú de totes les llengües,

lèxic i gramàtica, presenti una fórmula general, senzilla, rica, flexible, infinita, com el sistema mètric decimal, que sia de tots els pobles alhora, que tingui un sentit humà, general, no presentant cap perill a la dignitat o empar propi de cap poble. I aquesta solució, l'única possible, definitiva i satisfactòria per a tots, ha de venir, s'ha de fer més urgent i plena, no renunciant cap poble a la llengua pròpia, sense traïcions ni humiliacions d'uns que, per més contrast, hagin de resultar victòries d'altres.

Aquesta solució equitativa, humana, universal, la senten ja milers d'esperits nobles de tots els pobles, i, després d'assajar-la, la veuen meravellosa en l'esperanto. — Que ja no és una prova, que ja ha guanyat totes les proves del temps i de l'espai per a demostrar-se definitiva.

DELFI DALMAU

(Artikolo aperinta en la Barcelona ĵurnalo «La Veu de Catalunya» meze de la speciala informado pri la Konferenco de Genova).



Kanto spirita

Se l' mond', Sinjor', aspektas bele tia
vidate de rigard' kun via paco,
kion ankoraŭ Vi en viv' alia
al ni proponi povos por donaco?

Tial mi tiom kun ĵaluzo ŝatas
je okuloj, vizaĝ', — Sinjor', — je korp'
de Vi donita, kie ĉiam batas
koro... kaj timas tiom je la mort'!

De kiaj novaj sentoj Vi vidigos
tiujn bluan ĉielon super montoj,
vastan maron kaj sunon ĉie brilan?
Sentojn miajn plenigu Via pac',
kaj sopiros mi nur je blua spac'!
Tiun dirintan «Haltu» al neniu
momento, krom al tiu de la mort',
mi ne komprenas, mi, kiu haltigos

tiome da momentoj de tag' ĉiu,
 por ilin eternigi en la kor'!
 Aŭ tia «eternig'» jam estas mort'?
 Sed, tiam, kio estus do la vivo?
 Ĉu estus ĝi la ombr' de l' temp' pasanta,
 iluzi' pri la for' kaj pri l' apud',
 je la mult', aŭ malmult' aŭ tro', trompanta
 kalkulo, ĉar jam ĉio estas tut'?

Tute same! Ĉi tiu mondo, kia
 estas, laŭ temp' kaj diversec' tiela,
 ĉi tiu tero kun kreaĵo ĉia,
 tamen estas, Sinjor', patrujo mia;
 kaj ĉu ne povus esti ĝi ĉiela
 ankaŭ por mi patruj'? Mi homo estas
 kaj homa estas mia la mezuro
 por ĉio, kion povas sub lazuro
 esperi mi : ĉu Vi, se la espero
 kaj fido miaj tie halte restas,
 je tio min kulpigos en pretero?
 En pretero la stelojn kaj ĉielon
 mi vidas, kaj dezirus el homgento
 eĉ tie esti; se Vi tian belon
 al ĉio donis por okuloj miaj,
 se tiujn kreis Vi por admir sento,
 kial sen ili serĉi kroman celon?
 Se tia montros sin al mi nenia!
 Vi estas, ja : sed kie?... Kiu scias?
 Ĉio laŭ vid' similas Vin en mi...
 Mi kredu do...: Vi estas tie ĉi!
 Kaj kiam venos la timinda horo,
 kiam blindiĝos mia homa vido,
 al mi novan malfermu via fido
 por senfinan rigardi Vin, Sinjoro!
 Estu por mi la mort', naskiĝ' al gloro!

Katalune verkis JOAN MARAGALL

Tradukis JOSEP GRAU CASAS

Nova Vojaĝo Sentimentala

ankau nomita

La Apologio de Katalunujo

PROLOGO



VOJAĜANTE tra la mondo, en tero de Francujo kaj malfrunokte, je la alveno en stacio facile forgesiĝebla, kredante trovi dolĉan ripozon, la Vojaĝanto konsideris vagonŝanĝon kiel eblan plibonigon.

Etendita tra la dezerta kajo, griza pro la polvo de la kamparoj kaj malseka pro la nokta nebulo, kun la fenestroj fermitaj, estingitaj la lampoj, la vagonaro ripozadis. La Vojaĝanto, kun la lankovrilo sur ŝultro, eniris silente en la internon de nova vagono. Briladis en la duonlumo la randoj de la lakitaĵoj, la malvarmeco de la vitroj kaj la orumita varmeto de la metalaj vejnoj, tra kiuj la varmiganta akvo cirkulas senbrue.

Ĉar alproksimiĝadis la Paska libertempo, la vagonaro estis plena de lacaj kaj malgajaj personoj, nostalgie pensantaj pri la hejma dormoĉambro. Sed unu el la kupeoj estis okupata nur de du pasaĝeroj. Dankinte la ĉielon, la Vojaĝanto sin instalas tie.

Jen, do, ni havas jam pretaj la scenejon kaj la ĉefajn komparsojn de tiu ĉi granda historio. La vagono en la duonlumo. La Vojaĝanto, vizaĝe al la lokomotivo, sidante libere, komforte, tute laŭdezire. Antaŭ li, apud la fenestro, maljuna oficiro de la Franca armeo; ĉe la alia ekstremo, apud la koridoro, mezaĝa Monsinjoro, (1) de bela kaj nobla aspekto. Inter ĉiuj tri restas ankoraŭ, tute enigma, la spaco okupota de la veraĵ protagonistoj de la grava agado kiu nun prepariĝas. Kaj super ĉio, nevidebla sed reganta, — kiel dum la tagoj de la nostalgianta Grekujo — la serena mano de la Destino, malvolvante senkompatate la fortan fadenvolvajon de la Tempo, kiu neniam rompiĝas.

Ĉar la protagonistoj alvenos post nelonge kaj nenio estas farota nun, dum la vagonaro ripozas ni povas atente rigardi la mutajn kaj senmovajn figurojn de la komparsoj. Pri tiu de la Vojaĝanto, tamen, nenio estos dirata, ĉar la tradicia modesteco de la bonaj aŭtoroj devigas lin, por ke li ŝajnu tia, lasi sin mem en la ombro. Nu, komencante per la maljuna oficiro de la Franca armeo, vi vidos tuj, ke, en la senmovo kaj rigideco de lia figuro, la agla profilo de la nazo, daŭrigata vertikala-linie per la akuta harfasko de la barbo, estas tranĉata krucforme, horizontale, per la flankoj grizaj, molaj, abundaj,

(1) Ĉefpastro.

de la lipharo severa. La okuloj, estingitaj kaj fermitaj, dormetas en la fundo de la ombraj kavoj. Rigardu kian mildecon kaj energion havas lia korpo rigida, malgrasa. La manoj, maldikaj kaj fortaj. Kaj la ruĝa ĉapo apude, kun branĉoj kaj palmoj el oro malnova.

Sed diru al mi ĉu tiu belaspekta monsinjoro ne estas ankoraŭ pli mal-facile observebla, kun tiaj okuloj klaraj kaj brilantaj, kiuj eltenas vian rigardon neperturbeble, kun grandsinjora aroganteco. Strabe lin rigardante, oni vidas, tamen, ke li estas tre muskola, alta kaj fortika, kaj ke li havas la altkvalitan alkutimiĝon interparoli kun altrangaj sinjorinoj. Kaj diru ĉu vi ne miras je tiu lia glora kapo, el pompa delikateco, la frunto kiel spegulo, roze kaj cindre nuanca la koloro, la lipoj ondantaj pro la melodia parolado, kaj tiuj longaj bukloj glitantaj sur la sultro.

Estas necese diri — por la plej bona kompreno kaj grandiozecco de tiu ĉi eksterordinara historio — ke tiajn du personojn vi devas konsideri, de nun, kiel simbolojn. Imagu ke tiu maljuna oficiro povus esti la revata heroo, kiu, laŭ ĉiaj antaŭdiroj, estas alkondukonta al la venko, en proksima tago, la novan junularon de Francujo. Estas vero ke li ne havas la potencan korpan strukturon, nek la grasan abundecon de iu Napoleona marŝalo; sed ankaŭ, tute certe, lia severa figuro ne aspektus malbele, rajdanta sur ĉevalo, sub la Arko de la Stelo kaj enirante Parizon tra la Eliseaj Kampoj, post la kaleŝo de la princo de Orleans. Aliflanke, tiu ĝentila monsinjoro eble estas kiu denove alportos la pacon al la Franca eklezio. Eĉ lia figuro havas tiun simplan kaj serenajn majestecon de la statuo de Bossuet, ĉe la nordokcidenta flanko de la «Fontaine des Quatre Evêques», en la placo Saint Sulpice.

Se tiaj estas la komparoj, kiaj estos la ĉefaj ludantoj? Mi devas konfesi, ke, dum la vagonaro ripozadis, laŭlonge de la soleca kajo, la Vojaĝanto, nesciante la gravajn okazantaĵojn amasiĝantajn super nia vagono, ne multe atentis ja tiujn du simbolojn de Francujo. Kaj mi ankoraŭ memoras, ke la lasta ago de lia cerbo estis, antaŭ ol senti super la kapo la pezan manon de la Destino, kompari dolĉe, sub la faldoj de la lankovrilo, la absolutan, adorindan ripozon en tiu eŭropa vagonaro, je la terura bruo de aliaj libertempaj tagoj tra la suda Hispanujo, en vagonoj malkomfortaj, tumultoplenaj, kie la gitaroj zumadis unutonaj, la tutan nokton, sub la dolĉega plendluno de Aprilo.

Ĝus je la forveturo de la vagonaro ekdisvolviĝas tiu ĉi granda historio. Nun ni alvenas al la unua akto. La tri sonoradoj estas faritaj kaj la kurteno leviĝos. Tial la aŭtoro preĝas al la ĉiopovaj dioj, kiel estas dece, ke ili bonvolu helpi lin en la rakontado de tiu ĉi Nova Vojaĝo Sentimentala, ankaŭ nomita La Apologio de Katalunujo.

AKTO UNUA

La pordo de la koridoro malfermiĝis subite kaj aperis, kiel fantomo el la ombro, viro ne alta, kovrita per polvŝirmilo. Tiu ĉi estas (kaj pardonu la

ripetadon, kiun la kutimo pravigis) la unua protagonisto. Li enrigardis malrapide, kaj poste foriris. Sed li revenis, kaj ĉi tiun fojon li retiris la kurtenon de la lanterno pendants el la plafono. La sceno plene lumigis kaj ni rigardis unuj la aliajn. Post la viro noveveninta, eniris ankaŭ, kiel en familio, sinjorino nigrevestita, malgraseta knabo kaj juna servistino, ĉiuj kovrataj per la neoportuna polvŝirmilo, ĉar la nokto estis pluva kaj malvarma.

Kun takta, solena gesto, tute sen vortoj, la kvar ĵus alvenintoj plenigadis metode, sen atento pri ni estantaj malsupre, la malplenajn retbretojn. Ili alportis skatolojn, kestojn, valizojn, bastonojn, pluvombrelojn kaj, krome, ian grandegan paperkornon, en formo de piramido, kiun la juna servistino, meze de ĝenerala mirego, metis sur breton, super la majestecan kapon de monsinjoro, dum ŝiaj kunuloj rigardis ŝin agi emocie kaj korpreme.

Pli poste, kiam la intereso de la rakonto tion postulos, estos farata la detala priskribo de tiuj ĉi novaj pasaĝeroj. Nun ne povas esti; ĉar la viro estingis denove la grandan lanternon, kaj li kaj la sinjorino ripozas, iom nekomforte, inter la maljuna oficiro kaj monsinjoro. La malgrasa knabeto kaj la juna servistino sidas apud la Vojaĝanto, kiu rigardas ilin kun sekreta malamikeco.

La vagonaro rapidas tra la kamparo kaj la nokto estas pli malluma kaj peza. La tri vojaĝantoj de antaŭe, tre ĉagrenitaj, rezignis je sia dormado. La maljuna oficiro kovras nun per la ĉapo sian palan vizaĝon, kvazaŭ ne volante rimarki la sekvojn de la bedaŭrinda invado. La bona monsinjoro, timeme rigardante la grandan paperkornon balanciĝantan super li, primeditas kun ĝojo, ĉar li kredas kaj havas esperon, la nestareblecon de la homaj aferoj. Kaj la kompatinda Vojaĝanto, kiu tiel ĝojis pro sia feliĉa ŝanĝo, nun kredas terure je la malbonsorto, kaj, rigardante la enirintojn, komencas demandi al si: Kiu estas, de kie venas kaj kien diable iras, en malfruaj horoj de pluva nokto, tiuj kvar silentaj fantomoj, kun siaj ridindaj vestoj, de polvo kaj somero? Estas evidente ke tiuj kvar ne estas francoj. Pli eble, tiuj personoj estas el timema aŭ soleca karaktero, sed faranta sian volon. Kaj dum li diris tion al si, la Vojaĝanto vidis ilin ĉiujn rigardantajn, en la mallumo kaj strabe, la bonan monsinjoron kaj la maljunan oficiron, kaj rimarkigis ke, post ol rigardi, ili meditis. Sed en la fundo de la okuloj ili montris grandan bonecon; kaj la sinjorino nigrevestita kaj la juna servistino havis tiel mildan mienon de honesteco kaj tiel pacan gracion, ke la Vojaĝanto ekdeziris koni ilian landon.

Tiam estis kiam la sinjorino krucsignis sin, tre malrapide, kaj la knabo kaj la servistino ŝin akompanis. Kaj la sinjorino diris, tiele, kvazaŭ ŝi troviĝus ĉe ni:

— Sanktan nokton. —

Kaj flustris la servistino, kun granda dolĉeco:

— Sanktan nokton havu ĉiuj. —

La oficiro kaj monsinjoro eĉ ne aŭdis ilin. Sed la Vojaĝanto eligis profundan sopiron, por penetrigi en sian animon tiun senkomparan voĉon de

nia frateco. Jen la dolĉa Katalunujo, en plena nokto, tra la koro de Francujo!...

La aŭtoro opinias ke tiu ĉi momento estas tiel bela, ke per ĝi devas finiĝi la unua akto. La sceno estas definitive starigata. La terminoj de la problemo estas prezentitaj. Kvar katalunoj iras tra la mondo, noktomeze, inter la du vivantaj simboloj de la plej pura, delikata kaj nobla tradicio de Francujo. Alia kataluno, kaŝita, alivestita, sekvas — kun la animo pendanta de fadeno — la agadon de la protagonistoj. Kaj nun estus konvena, por fini per grandioza maniero, la plena voĉo de la Wagner'aj trumpetoj demandanta la Destinon:

Kio okazos?...

La respondo estos la celo kaj la ĝojo de la akto dua, kiu komenciĝos, akurate, je la unuaj horoj matenfrue. Sed, por se iu trovus necesa kompletigi tiun unuan parton de nia bela historio per la priskribo de la kvietaj horoj kiuj mankas ĝis la tagiĝo, la Vojaĝanto diros, ke, dum ĉiuj aliaj maldormis ĝene, embarasataj kaj palaj pro la laciĝo kaj sendormo, la sola kiu dormiĝis en profunda paco estis la kataluno de la polvŝirmilo. Kaj ne nur dormadis por ripozo kaj balzamo de sia spirito, sed ankaŭ, por kaŭzi pli da envio al la nedormantoj, li brue spiradis de korpa ĝuo, kaj ĝemetis, kaj tute fandiĝis en dormon tiel bonan, kvazaŭ estus en plena somero, ĉe ni, kiam zumas la cikadoj kaj la okuloj fermiĝas malrapide en la dolĉa ombro de la pajlejo.

AKTO DUA

La akurateco estas tute ŝatinda duonvirto. Tial la aŭtoro, homo akurata, reprenas sian belan sentimental-an historion ĵus kiam, el la fundo de la horizonto, ekfloris pala kaj naskiĝanta klareco, super la vasta paco de la tero dormiĝinta.

Povus okazi, afabla leganto, ke — post la esperoj kiujn al vi mi ekvidiĝis — la historio de mi rakontita ŝajnus al vi banala. Sed se via saĝeco scias grati sub la maldikan ŝelon de la eksteraĵoj, ĝi certe trovos la agrablan molajon de diskreta instruo. Kaj, ĉiuokaze, bonvolu kulpigi la Destinon pri la negravaĵoj de mi rakontataj. Ĉar mi estas la skribanto kaj ĝi la tirano kiu diktas.

La tagiĝo, amata de Homero, kovris la vizaĝojn per pala fosforeska koloro. Ĉiuj, fine, estis ekdormiĝintaj. La lampo estingiĝadis kaj la oleo, verda kaj densa kiel likvoro, briladis en la fundo de la sfero, en kiu rebrilis per oraj kaj rozaj nuancoj, kiel miniaturoj, la forglitantaj bordoj kaj la ombroj de la forkurantaj aĵoj. Ekstere, perle briladis ĉe la vitroj la grizeco de l' mateno kaj tio igis pli dolĉa la varmeton de la vagono. Tago nova, animo laca, horo profunda.

Sed atendente ke la dormantoj vekigu, vi ja povas diri, leganto — vi, kiu amas la spektaklon de la kampoj kaj la akvoj kaj la ĉieloj nepenetreblaj, ĉar vi havas en la koro guton de la viruso de Rousseau kaj estis, feliĉe

aŭ malfeliĉe, samtempulo de l' impresionismo — vi ja povos diri al mi ĉu ne estas ja admirinda, en tiu matena horo, la gracia abundeco de Francujo.

Rigardu, ekzemple, je la dekstra flanko, tiujn lumoplenajn ulmojn, tiel klarajn, kiuj vice staras en la malproksimo, kronitajn per griza aro da kolomboj. Kaj maldekstre la malnovan farmodomon, el ruĝkolora tegmento, kun la ĉaroj apud la pordo, sub la ombro de la arboj. En tiu malgranda ĉambro rigardanta okcidenten, kiam estis dek-kvinjara kaj ellitiĝis je tagiĝo por iri al siaj aĉetoj, faris sian tualeton, sub la lumo de la fuma lampo, Mme. Bovary. Sed rigardu, ankaŭ, tiun senliman verdecon de la semitaj kampoj, kiun la spiro de la nevidebla rivero malheligas per freŝa fumvualo. La kanejoj, zumantaj kaŝite en la malseka ombro de la torentoj, faras bruon akran kaj sonoratan kiel sovaĝaj flutoj. La frumatena venteto estas freŝa kiel rozo. Tero glata, tero fruktodona, tero milda. Kaj super ĝi la ĉielo, ne kun la alta delikateco de la ĉielo de Italujo, nek kun la seka kaj profunda brilo de Kastilujo, nek kun la trankvila paco de nia lando, sed pli apudtera kaj nebula, kaj tamen delikata kiel silko.

En nian vagonon, meze de plena silento, la sunleviĝo penetrigis, iom post iom, helan lumradion. La figuro de monsinjoro iĝis orita. La bukoj el arĝento briladis sur la ŝtrumpo silka kaj klara. La vestaĵo, tre pura. La kapo, aŭreolita kiel suno.

La luma franĝo leviĝadis. Super la kapo de monsinjoro, la granda paperkorno de la katalunoj, banita en la taga klareco, iĝis mistere diafana. La suno ĝin transiris per oraj sagoj. Tiam aŭdiĝis el ĝia interno malforta brueto, kiel tiu de plumfasko. Kaj kanto de birdo elŝprucis tre pura, en tiu pacoplena horo, kun ĝojo intima kaj serena. Ĉiu ekvekiĝis, turnante supren la okulojn, kaj kun mano ĉe la koro. La maljuna oficiro rigardadis surprize la Vojaĝanton, kaj la Vojaĝanto rigardadis kun surprizo la bonan monsinjoron. Poste ĉiuj ridetis, ĉar la birdo bele trilis kaj neniu atendis tiun bonan-tagon.

Tiam la sinjorino nigrevestita, kiu estis el la ĉirkaŭaĵoj de Girona, diris tiel al la juna servistino:

— Knabino, vi devus ŝanĝi la akvon al la kardelo kaj aranĝi ĝian manĝaĵon.

Katalunujo venkis je la unua batalo. Por mallevi la grandan paperkornon, la bona monsinjoro starigis, kaj lasis lokon. Malkovrinte la kaĝon simple plektitan el kanoj ili ne sciis kion fari el la paperkorno. Sed la maljuna oficiro prenis ĝin inter la manojn kaj ridetis feliĉa kaj silentis. Kaj la Vojaĝanto, kiu ankaŭ volis partopreni la feston, havis la ĝojon teni per siaj mal-lertaj fingroj la malgrandetan vitran trinkvazon, kiam la juna servistino, kliniĝante al la fenestro, aranĝis la manĝaĵon.

Jam prizorginte la kardelon, la sinjorino, la infano kaj la knabino, kuniĝitaj ĉirkaŭ la patro severa, matenmanĝetis panon kaj ĉokoladon. La sinjorino uzis ankoraŭ ian reton, ĉe la kombaĵo, kiel en forpasintaj tempoj. Ŝia vizaĝo estis kvietaj kaj fidela. La servistino humile mallevis la okulojn. La

knabo strabe alrigardis la maljunan oficiron. Kruĉeto el lado, kun klara akvo, pasis de mano en manon. La tri spektatoroj, logitaj de tioma simpleco, rigardadis silente.

Ĉu vi scias de kie venis ĵbona Dio! la kvar katalunoj kun la gaja kardelo?... Tiu severa viro, el kapo ronda, grizaj kaj hirtaj haroj, frunto mallarĝa kaj ruza, rigardo senbrila sed saĝoplena, tiu ĉi viro razita kaj modesta, kiun vi vidas kontraŭ vi, vendadas lignon, feron, teksaĵojn, ŝtonojn kaj kordon dum ĉiuj tagoj de la jaro. Tiu viro naskiĝis apud Tossa, en la hejmo de mizera lignajisto. Hodiaŭ, post kvindek jaroj da batalo tage kaj nokte, tiu viro havas vastajn magazenojn kaj loĝas en Barcelono. Lia knabo naskiĝis jam en la granda ĉefurbo kaj klinos sin, eble, al la advokateco. Tiu viro, je sia dek-kvinjara aĝo, falis mezen de Londono, kiel en mezon de dezerto. Sekve de tia falo, tiu viro konas la komercon en ses lingvoj, la malsaton, la malvarmon kaj la nigran mizeron. Tiu viro komencis labori je sia propra profito en la jaro 1887. Ses tagojn semajne li laboradis ĉe la strato Moles, sen aero kaj sen lumo. Ĉiun festotagon li supreniris al la monto Montjuic kaj rigardadis la senliman urbegon. «Tiomaj manmezuraĵoj da tero — li diris al si — kaj neniŭ estas cial!» Tiam li sentis densan mallumon en la fundo de l' animo; sed dum la semajno, kun la ŝvito de la laboro, ekardis en ĝi la lumeto de l' espero. Tiu viro estis honesta kaj, por ne diboĉi, baldaŭ edziĝis.

Ian dimanĉon, kondukante al Montjuic sian edzinon, tiu viro ekvidis de malproksime la Universalan Ekspozicion kaj tiun legendan hotelon, kiun tie konstruadis la arkitekto Domènech. Tiu viro, tiam, timiĝis pro miro. Kaj diris al la edzino: «Edzino, ĉi tion ja ni devas vidi. Se estus en Londono aŭ Parizo, mi dirus al vi ke ne. Sed ĉi tie estas ĉe ni». Per tiel simpla maniero tiu viro eniris la socian sferon.

Kiam la aferoj marŝis pli bone, tiu viro ridadis ĝis krevoj ĉe la unuaj teatroludoj de la verkoj de Pitarra. Pli poste, pro sekreta kaj neklarigebla instinkto, li abonis la ĵurnalon «La Renaskiĝo». Tiam estis kiam tiu viro prudenta, kiu ĉiam allasis la insultojn por la personoj nekalkulemaj, ian vesperon dum kantado de «Segadors» (1) en plena Ramblo, ekkriis — Dio pardonu lin! — «nacion» blasfemon kaj poste, forkurante, ricevis bastonbato ĉe la kruro. Tiu viro sentis naskiĝi en sia interno novan forton, kiam li legis la paroladojn de doktoro Robert. Tiu viro prenis la Orient-Ekspresan vagonaron kaj perdis bonan negocon pro la deziro esti alveninta en Barcelono la 20^{an} de Majo 1906, okaze de la Kataluna Solidareco.

Tiu viro travojaĝis la tutan Eŭropon kaj vidis dek-dufoje la riĉegan foiron de Nidji Novgorod. Sed li fariĝis maljuna laboranto kaj ne havis ja emon por la literaturo. Lia filo sin dediĉos al ĝi, eĉ troe. Li, nekontraŭstarebla, estas de longe malamiko de ĉia afekteco. Kaj, preter ĝia praktika aŭ morala aplikado, la intelekto facile iĝas afekteco pura. Ĉar estas tiel fundamenta

(1) La kataluna himno.

ĉe ni tia viro, rigardu lin sidantan, masivan kvazaŭ trunko, sekan kvazaŭ radikoj. La ekstera mondo aperas antaŭ liaj okuloj kiel vasta foiro, kie fariĝas tre malfacile vendi kaj aĉeti. Tamen li konas la sekretojn pri tio kaj tie li movas sin akre, kiel meze de batalo. Sed alie la domo kaj la hejmo estas al li mole karesaj kiel monkesto de infano. La domo fermita kaj la knaboj kaj virinoj en ĝia interno. Kaj li, dum la vesperoj, post la laboro, sidigas meze de ĉiuj, kun la frunto hela de saĝo kaj forto.

Tiu viro nun revenas el Rigo, kie li havas multe da komercaĵoj kaj kien li kondukis por dek-kvin tagoj, ĉirkaŭ la Pasko, la edzinon, la filon kaj la servistinojn kiu portas la kardelon.

— Panjo, mi soifas, — diris ĉirkaŭ la deka horo la maldika knabo.

Kaj la sinjorino nigrestita — kies nigra vesto ne montris funebron, sed nur, ke ŝi estas humila kaj simpla, — konsultinte la vizaĝon de sia edzo, respondis:

— Nun ne trinku, ĉar vi perdis la apetiton por la tagmanĝo. —

Je la tagmezo, monsinjoro, la oficiro kaj la Vojaĝanto eliris al la vagono-restoracio. La severa kataluno rigardadis ilian foriron per riproĉaj okuloj, kvazaŭ ili irus al diboĉejo.

Je ilia reveno en la vagono, imagu kiaŭ miron: el meze de delikataj paperoj kaj rubandoj, la katalunoj eliris rondforman «tortell». De kie estis veninta tia deserto, tiu bongusta «tortell» plena de konfitaĵo, hejma krono de la Pasko? Ĉu ĝin preparis la sinjorino mem, en Rigo, dum la libertempaj horoj, helpata de la juna servistino? Aŭ ĉu la propra Sankta Jako, patrono de la nacia bakejo, mirakle alportigis ĝin per manoj nevideblaj?... Kiam la sinjorino tranĉis ĝin, en kvar pecoj, ĝi disverŝis ŝatindan bonodoron.

Finita la tagmanĝo, la tagmezo estis peza kaj malhela. Nuboj kaj nebuloj ruliĝis tra la ĉielo kaj la folioj de l'arboj brueadis apud la malsekaj legomkampoj... Nun preterpasas granda kaŝtanujaro kaj la tero resonas sub la densaĵo de la senfinaj branĉaroj. La ombro estas densa kaj akvosaturita kiel en la fundo de la keloj. Kaj pikitaj de la soleco, kiu naskas la dezirojn, la frenezaj hederoj preme alkruciĝas al la korpo solida de la brunaj trunkoj. Maljuna paŝtisto, kuŝanta surtere, rigardas ilin bonvola kaj serena, kvazaŭ senmorta dio... Revenante al la klara kamparo, oni blindiĝas pro la hela lumo. Tagmezo malrapida, horo peza. La animo saturetiĝas de unutoneca laciĝo.

Sur la brusto de la edzo la fidela edzino ekdormiĝadis. La knabo, de la fundo de la molaj kusenoj, rigardadis la ruĝan ĉapon de la oficiro. De tio venis al li ideo; sed de tiu ideo naskiĝis forta deziro. Iom post iom li stariĝis kaj per la fingraj pintoj karesis la orajn palmojn ĉirkaŭantajn la ĉapon. La maljuna oficiro vidis tion. Kaj preninte la ĉapon li ĝin metis sur la kapon de la malgrasa knabo. La infano tremis de ĝojo kaj honto. Tiam la oficiro levis lin inter siajn brakojn kaj kisis lin ĉe la frunto.

Jam en la malfrua vespero, la aŭtoro sentas ke la lasta horo alproksimiĝas kaj granda melankolio invadas lian koron. Tiam, laŭ ordono de la

patro, la katalunoj stariĝis. Ili prenis la kestojn, la bastonojn kaj pluvombrelojn, la valizojn, kaj la kaĝo eniĝis denove en la grandan paperkornon. Je la alveno en la proksima stacio, kie ili devis ŝanĝi je vagonaro, la kvar katalunoj de tiu ĉi bela historio adiaŭis nin. Monsinjoro kuntiriĝis por cedi la lokon al ili. Kaj la maljuna oficiro ridetis, rigardante la knabon. Ili foriris. Tra la koridoro eĥis la forta voĉo de la patro, plena de saĝo:

— Zorgu, paŝu atente. —

Kaj la bona Vojaĝanto vidis ilin unu fojon ankoraŭ, malproksimajn, sur la kajo, kovritajn per la polvŝirmilo, apudiĝintajn al la patro.

Se eble, la Vojaĝanto estus plorinta tiam. Ĉar tiel tiu vojaĝo povus esti alnomita, tute prave, sentimentala. Sed, kiam la vagonaro ekmoviĝis, la maljuna oficiro, ekparolante meze de granda silento, demandis al monsinjoro, kiu lin rigardis kaj ridetis:

— De kie estas tiuj bonaj homoj? —

La pastro respondis:

— Mi ne scius diri tion, sinjoro. La lingvo kiun ili parolis estas al mi nekonata. —

Tiam, ambaŭ samtempe, ili rigardis demande la bonan Vojaĝanton.

Kaj ĉi tiu parolis:

— Tiuj homoj, kiujn vi, sinjoro oficiro, kvalifikis «bonaj» kun la konsento de monsinjoro, loĝas tiel apude de Francujo, ke eĉ oni povus diri ke ili estas ĉe vi. Tiu ĉi estas familio de katalunoj. —

— Estas katalunoj; — ekkriis monsinjoro; — tiam ili estas hispanoj. —

Kaj la Vojaĝanto respondis:

— Tute certe, monsinjoro; ili estas hispanoj. Sed...—

Kaj tie ĉi komenciĝas La Apologio de Katalunujo.

(Finota)

AGUSTI CALVET

El kataluna lingvo tradukis

JAUME GRAU CASAS



La Béziersa Kongreso

Kiam ni jam estis aranĝintaj ĉion pri la kataluna karavano, ni ricevis de la Sekretariino de la Organiza Komitato, Fraŭlino Rok-sano, la malagrablan sciigon ke la Kongreso ne okazos, pro nesufiĉa aliĝo de la franca samideanaro.

ENLANDA MOVADO

BARCELONA. — «Ĥemia Rondo Esperanta» estas konstituiginta ĉe la «Escola de Directors d'Indústries Químiques», en la Industria Universitato, sub la gvidado de la nova kaj entuziasma samideano J. Mons, ĥemia studento.

— La societo Pomell de Joventut «Poncelles d'Or» okazigis esperantistan feston, la 9^{an} de Aprilo. La geanoj kantis katalunajn kaj esperantajn kantaĵojn kaj prezentis la komedion «L'Esperanto sense professor». La kataluna poeto S-ro Martínez deklamis kelkajn el siaj verkoj. S-ro Grau, Redaktoro de *Kataluna Esperantisto*, legis tradukitajn versaĵojn kaj faris propagandan paroladon. La Prezidantino F-ino Maria Vilà finis la feston per mildaj vortoj favoraj al Esperanto kaj dankis ĉies helpon al la sukcesinta festo, per kiu esperanta semo estis ĵetata en la vastan kampon de la famaj katalunaj societoj «Pomells de Joventut».

— La revigliĝinta Grupo «La Metiisto», kiu disvolviĝas interne de la populara societo «El Artesano» en la Gracia kvartalo, esprimis sian aliĝon al K. E. F. Ni esperas ke la nove aliĝinta Grupo firme plikreskigos la Barcelonan movadon.

GERONA. — La grupo «Ĝerona Espero», en sia lasta ĝenerala kunsido, elektis la jenan Direktan Komitaton: Prezidanto, D-ro Josep Casanovas, Ptro.; Vic-prezidanto, S-ro Casià Costal, Direktoro de la Normala Lernejo por Instruistoj; Sekretario, S-ro Miquel Millà; Vic-sekretario, S-ro Conrad Domènech; Kasisto, S-ro Josep Ferrer; Kalkulistino, F-ino Carme Maymi; Bibliotekisto, S-ro Francesc Hil; Voĉdonantoj: S-roj Geroni Boris, Ramón Casademont kaj Amadeu Peris; Voĉdonantinoj: S-ino Dolors Baliarda de Carerach, F-ino Ana Coll kaj F-ino Teresa Colls.

— La grupo «Studenta Juneco», de la Pastra Seminario, organizis por la 25.^a de Marto religian esperantan feston. Matene, je la 7^a, okazis solena Meso kun esperantlingva prediko farita de D-ro Josep Casanovas. Poste, en la sidejo de la Grupo, oni legis literaturaĵojn kaj la «Schola Cantorum» faris voĉkoncerton. Fine samideanoj Font Giralt (Prezidanto), Joan Costa kaj Pastro Casanovas paroladis pri esperantaj temoj.

ESPERANTAJ GAZETOJ

intersaĝe ricevitaj de «Kataluna Esperantisto», publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

- | | |
|--|--------------------------------------|
| Egipta Esperantisto, Aleksandrio | Nova Tempo, Wien |
| Le Monde Espérantiste, Paris | Literaturo, Wolwyn Garden City |
| Esperanto-Praktiko, Berlino | Bulgara Esperantisto, Sofia |
| Belga Esperantisto, Gand | Ladina Patrujo, Bologna |
| La Marto, Haida | The British Esperantist, London |
| La Semisto, Sabadell | Holanda Esperantisto, Haag |
| Germana Esperantisto, Dresden | Libero, Kioto |
| Hispana Esperantisto, Madrid | Amerika Esperantisto, Boston |
| Katolika Mondo, Graz | Espero Teozofia, Praha |
| Espero Katolika, Udenhout | L'Esperanto, S. Vito al Tagliamento |
| Kristana Espero, Laihia | La Revuo Orienta, Tokio |
| Verda Utopio, Osaka | Arguso, México |
| La Progreso, Plzen | Brazila Esperantisto, Rio de Janeiro |
| Esperanta Finnlando, Helsingfors | Oficiala Gazeto Esperantista, Paris |
| La Esperantisto, Wien | Ĉeĥoslovaka Gazeto, Praha |
| La Laborista Esperantisto, Hannover | Nova Eŭropo, Praha |
| Nova Tagiĝo, Genève | Brazila Vivo, Fortaleza-Ceará |
| Hungara Esperantisto, Szeged | Agitanto, Kronstadt |
| Esperanto Triumfonta, Köln | Bizantio, Konstantinopolo |
| Bulletin de la Société Française pour
la propagation de l' Esperanto, Paris | La Espero, Stockholm |
| Internacia Pedagogia Revuo, Antwerpen | Sennacieca Revuo, Paris |
| Litova Stelo, Kaunas | Esperanto (U. E. A.), Genève |
| France-Esperanto, Paris | La Intersaĝo, Béziers |
| | La Eklezia Revuo, Huddersfield |



LEIPZIG-A FOIRO

La ĝenerala internacia Foiro
de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo.
Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Foiroj
por Tekniko kaj Konstrufako

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27a de aŭgusto ĝis
2a de septembro:

Printempa Foiro 1923 de la 4a ĝis 10a de marto.



Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Foiroŝicejo
por la Specimenfoiroj en Leipzig:

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

